

Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Esperantista de Rio de Janeiro

PENSO KAJ LABORO POR LA UNIVERSALA FRATECO

DIREKTORO: NELSON PEREIRA DE SOUZA

ĈEFREDAKTORO: LASZLÓ ZINNER

JARABONO

BRAZILIO — Cr\$ 15,00
Eksterlande — Cr\$ 30,00
Aŭ 25 Respondokuponoj

RIO DE JANEIRO, DECEMBRO, 1947

JARO I

Monata eldono

N.º 9

Redakcio kaj Administrejo
R. das Marrecas, 19, 2.º and.
Tel.: 22-5300 — C. P. 3677
Ekzemplero — Kr\$ 1,00

EM BUSCA DE UM CAMINHO

D-rino Ilka Duque Estrada

Os esperantistas formam uma classe de gente que encontrou o seu caminho, a sua missão no mundo.

Chegaram à conclusão de que para evitar guerras não bastam pactos de solidariedade, congressos e reuniões sentimentalistas. O melhor meio é fazer com que os homens se entendam por meio de uma língua, não importa em que parte do mundo tenham nascido. Esta língua é o Esperanto.

A idéia logo encontrou eco e em todos os lugares do mundo houve gente que se dispôs a estudar e a falar o Esperanto.

A primeira parte do programa traçado está cumprida? E agora?

De que maneira fazer com que não sejam apenas um punhado, aqueles que se interessam pelo Esperanto?

Puzeram-se a pensar e acharam que a melhor maneira é interessar as diversas classes sociais, criando uma disposição psíquica que possa fazer face aos fatores sociais coletivos que levam os povos às guerras.

Aí está justamente o ponto nevrálgico da questão. Temos que romper primeiramente com este atavismo bélico que está em cada homem e que predispõe sempre uns contra os outros, uma idéia contra outra idéia, um trabalho contra outro trabalho.

Só quando nos tivermos penetrado de que todo o trabalho é bom desde que produza bons frutos, estaremos realmente fazendo alguma coisa pela fraternidade universal.

Nunca mais oportuno do que a lição que nos legou um grande

Mestre. Nela há poesia, amor, e, acima de tudo, compreensão.

*
* *

“Numa estrada muito comprida cujo princípio não se via e o fim não se encontrava, estavam caminhando três homens.

Um era cego de nascença. Ouvia falar de fórmulas mas não compreendendo, não acreditava. Apenas no tato acreditava. Às vezes pensava: não há olhos, para que olhos? Não há nada que possa produzir mais do que o contato das mãos.

O segundo, do que era vibração sonora não experimentava coisa alguma.

O terceiro era mudo. Seus lábios jamais puderam pronunciar som algum.

Esses três homens haviam se encontrado na estrada cujo princípio não se via e o fim não se encontrava. Estavam procurando Deus.

Ao se encontrarem, cada um compreendeu que os outros eram portadores de dons que lhes faltavam e portanto seriam complementos.

Quando estavam andando nesta estrada, uma estréla cortou a esfera e tombou muito além do horizonte, produzindo um barulho ensurdecedor.

O que era surdo parou. O clarão do céu era tão extraordinário que o sobressaltou.

O cego, diante do clarão nada percebeu, mas o barulho foi tão intenso, que foi tomado de pavor.

Estes homens entraram a dar grandes brados pedindo socorro.

O mudo escutou, viu o clarão e como não podia falar, parou

também. Sentaram-se todos, e cada um, pela fórmula que podia, invocou os seus anjos protetores para que pudessem atingir a divindade.

Em sentido contrário apareceu um ponto que vai-se aproximando. Era um homem que possuía longa barba branca.

Os três companheiros de jornada pediram que lhes explicasse a razão daquilo que os sobressaltara tanto.

E cada um, com os recursos de que dispunha, manifestou o que havia sentido.

O que escutava, exaltava, analisando o barulho. O que era surdo mas enxergava, negou o barulho, apenas apresentava como motivo de sua observação, o extraordinário clarão.

O homem das barbas brancas escutou pacientemente, e batendo com a mão no ombro do que não via, disse:

— Filho, eu te compreendo. Fui cego, procurava ignorar as causas.

Ao surdo, também falou:

— Eu te compreendo, fui surdo tantas vezes, surdo às realidades superiores. Não ouvia em mim próprio a voz da consciência que constantemente me apontava o caminho. Compreendo o teu estado.

Ao mudo falou:

— Também te compreendo, fui mudo por conveniência e nunca pude ser mudo por compreensão.

Mas um dia compreendi que as imposições, as limitações são mais sinais de inferioridade do que de elevação.

Esperanto-Kunvenoj en Rio de Janeiro

ASSOCIAÇÃO ESPERANTISTA DO RIO DE JANEIRO — Rua das Marrecas n.º 19, 2ª etapa. Kulturkunveno ĉiusabate je la 16,30 horo. Direktoroj ĉiutage de la 18ª ĝis la 21ª horo..

BRAZILA KLUBO “ESPERANTO” — Praça da República n.º 54 — 1ª etapa. Kunveno ĉiusabate je la 16ª horo. Ejo malfermita ĉiutage de la 13,30 ĝis la 17,30 horo.

ESPERANTO-KLUBO ĈE Y. M. C. A. — Rua Araujo Pôrto Alegre n.º 36. Klubkunveno ĉiuvendrede la 19,30 horon. Direktoroj ĉiutage post la 18ª horo.

ESPERANTO-RONDO DE OLARIA — Rua Leocadia Rego n.º 7. Kunveno ĉiujauĝe de la 20ª horo.

E’ preciso ter os olhos muito abertos e enxergar o mais longe possível. E’ preciso ter ouvidos e saber ouvir, tudo olhar e tudo ver, e muitas vezes é preciso falar, mas aquele que tiver a percepção — e por isso terá a barba branca — agirá de acordo com o seu próprio eu.

Se os homens não procurarem compreensão acima de tudo, na sua forma de relação com o mundo exterior, nunca poderão passar de macaquinhos, fechando olhos, ouvidos e boca, nada mais farão que arremêdo.”

— Ŝiŝi diris, ke ŝi dancus kun mi, se al ŝi mi alportus ruĝajn rozojn; sed en la tuta ĝardeno estas nenia rozo ruĝa! parolis malĝoje la studento.

En sia nesto, kaŝita inter la branĉoj de kverko, la najtingalo aŭdis tiajn plendojn k, mirigita, ekrigardis tra la foliaro.

— Eĉ unu rozo ne estas en mia tuta ĝardeno! — rediris la studento — k siaj okuloj pleniĝis de larmoj. — Ha! De kiaj malgrandaj aferoj dependas la feliĉo! Mi estas leginta ĉion, kion la saĝuloj verkis, k mi konas ĉiujn sekretojn de la Filozofio; k, spite tio, pro manko de ruĝa rozo, mi estas kondamnita pasiĝi malfeliĉan vivon!

— Jen vera amanto! ekkriis la najtingalo. Lin mi estas kantinta, nokton post nokto, eĉ antaŭ ol nia interkonatiĝo; nokton post nokto, mi ripetis lian historion al la steloj, k nun mi havas la plezuron vidi lin. La bukloj de liaj haroj estas malhelaj kiel la floroj de hiacinto, k liaj lipoj ruĝaj kiel la rozo, kiun li varme deziras; sed la ampasio igis liajn vangojn palaj kiel eburo, k la doloro stampis sur lian fruton sian sigelon.

— Morgaŭ, la princo estros balon — daŭrigis la studento — k mia amatino partoprenos ĝin. Se mi alportos al ŝi ruĝan rozon, mi povos ĉirkaŭbraki ŝin k havi ŝian kapon sur mia ŝultro, k preni inter la miaj ŝiajn deikatajn manojn. Sed estas nenia ruĝa rozo en mia ĝardeno; tial mi restos sola ĉe angulo, k ŝi ne rigardos min. Mi restos tute forgesita k mia koro krevos pro malĝojo.

— Jen la vera amanto; rediris la najtingalo. Li sentas k suferas tion, kion mi kantas; tio, kio por mi estas plaĉo, por li estas turmento. La amo certe estas mirinda afero; pli altvalora ol la smeraldoj, k eĉ pli malofta ol la puraj opaloj; oni ĝin ne aĉetas per perloj aŭ gulutoj; nek en la vendejoj oni ĝin komercas; la komercistoj ne liveras ĝin, nek per pesiloj oni ĝin pesas; k neniu taksas ĝin laŭ ora valoro.

— La muzikistoj dolĉe k perfekte ludos — daŭrigis la studento. Mia amatino dancos je la sono de l' harpo k violono; tiel delikate ŝi dancos, ke ŝiaj piedoj preskaŭ ne tuŝos la plankon, k la korteganoj, ravitaj, ĉirkaŭos ŝin; sed ŝi ne dancos kun mi, ĉar nenian ruĝan rozon mi havas por donaci al ŝi.

La najtingalo k la rozo

Fabelo de Oscar Wilde

Dirante tion, li falis senkuraĝa sur la herbon, kaŝante la vizaĝon en la manoj k plorante amare.

— Kial li ploras? — demandis eta verda lecerto, preterpasanta kun la vosto levita.

— Jes, kial li ploras? — insistis papilio, kiu flugetadis serĉante sunradion.

— Kial ploras li? — murmuris lekanteto al sia najbarino.

— Li ploras pro ruĝa rozo — respondis la najtingalo.

— Pro ruĝa rozo! Kiel ridinde! — ekkriis ĉiuj; k la lacerto, kiu estis iom cinika, ekridegis.

Sed la najtingalo komprenis la sekreton de la ĉagrenoj de l' studento, k restis silenta inter la branĉoj, pripensante la misteron de la amo.

Subite, ĝi ekflugis. Kvazaŭ ombro, ĝi trairis la aleon k la tutan ĝardenon. En la mezo de bedo, staris gracia rozarbeto. Ekvidante ĝin, la najtingalo alflugis al ĝi, k sidigante sur ĝiajn branĉojn, diris:

Donu al mi ruĝan rozon, k por vi mi kantos la plej belan kanzonon.

La rozarbeto skuis la kapon k diris: miaj rozoj estas blankaj kiel la ŝaŭmo de l' maro, pli blankaj ol la montara neĝo. Iru al mia fratino, kiu staras ĉe la suna horloĝo; eble, ŝi kontentigos vin.

La najtingalo iris al la rozarbeto staranta ĉe la suna horloĝo. — Donu al mi ruĝan rozon, k mi kantos por vi la plej belan kanton.

Sed la rozarbeto skuis la kapon. — Miaj rozoj estas flavaj; tiel flavaj kiel la haroj de sireno sidanta sur sukkena trono; pli flavaj ol la tritiko maturiganta sur kamparo antaŭ la veno de la falĉisto kun la falĉilo. Iru al mia fratino, kiu loĝas sub la fenestro de l' studento. Eble, ŝi kontentigos vin.

La najtingalo iris al la rozarbeto, kiu staris sub la fenestro de la studento.

Donu al mi ruĝan rozon, — ĝi diris — k por vi mi kantos la plej belan kanzonon.

Sed la rozarbeto skuis la kapon:

Miaj rozoj estas ruĝaj kiel la piedoj de la kolomboj; pli ruĝaj ol la koralo de l' Oceano; sed la

vintro glaciigis mian sangon en miaj vejnoj; la frosto mortigis miajn burĝonojn, kaj la ŝtormo rompis miajn branĉojn. Ĉi jare, mi ne liveros rozojn.

— Nur unu, nur unu ruĝan rozon, bonvolu — diris la najtingalo — ĉu ne estas iu rimedo por ĝin akiri?

— Estas, ja, iu rimedo — diris la rozarbeto — sed ĝi estas tiom kruela, ke mi eĉ ne kuraĝas diri al vi.

— Diru — insistis la najtingalo — mi ne timas!

— Se vi deziras ruĝan rozon, vi devas krei ĝin per la sono de via kanto je la lunlumo, kaj kolorigi ĝin per la sango de via koro. Vi kantu kun la brusto premata kontraŭ unu el miaj dornoj, vi kantu dum la tuta nokto; la dorno trairovian koron, k la sango de via vivo ekfluos en miajn vejnoj k iĝos mia sango.

— Doni la vivon por ruĝa rozo estas aĉeti multekoste, tro multekoste — diris la najtingalo — k ni ĉiuj amegas la vivon. Estas tiel agrable vivi inter la kreskajaro, vidi la sunon en sia ora ĉaro k la lunon en sia ĉaro el perloj! La parfumo de la florantaj dornarbetoj estas tiel milda! Tiel belaj estas la bluaj floretoj de la valoj k la eriko de l' montoj! Sed la Amo valoras pli ol la vivo; k, kion valoras la koro de birdo, kompare al koro de viro?

K, ekflugante kvazaŭ ombro, ĝi iris al la studento ankoraŭ kuŝanta k kun la okuloj ankoraŭ malsekaj.

— Ĝoju! — ekkriis la najtingalo — estu feliĉa! Vi havos la ruĝan rozon de viaj deziroj; estas mi kiu kreos ĝin per la notoj de mia kanto sub la lunlumo, k kolorigos ĝin per la sango de mia koro. Mi nur petas ke, memore je tio, vi estu fidela amanto. La amo estas pli subtila ol la tuta saĝo de la filozofoj, k pli nerezistebla ol la forto de la povo; ĝiaj flugiloj havas la koloron de l' fajro, k ĝia korpo estas ruĝa kiel la flamoj; ĝiaj lipoj estas dolĉaj kiel mielo, k ĝiaj elspiroj bonodoras kiel incenso.

La studento levis la okulojn por aŭskulti atente. Tamen li nenion komprenis, ĉar li sciis

nur tion, kio estas skribita sur la libroj. Sed la kverko komprenis k restis malĝoja, ĉar ĝi tre amis la najtingalon, kiu konstruis neston en ĝiaj branĉoj.

— Kantu ion por adiaŭi min — ĝi diris mallaŭte — mi restos tiel malĝoja k tiel sola, kiam vi foriros!

La najtingalo kantis por la kverko, k sia voĉo estis kiel la murmurado de akvo en arĝenta fonto.

Kiam ĝi estis finanta, la studento starigis k prenis el la poŝo notkajeron k krajonon. La najtingalo — diris li, marŝante — kantas belege, sed, ĉu havas ĝi sentemon? Mi kredas, ke ne. Certe ĝi estas kiel la plimulto el la artistoj: multajn ornamojn, sed nenian sinceron. Ĝi ne kapablas sin oferi por iu; ĝi pensas nur pri muziko, k ni ĉiuj scias, ke la artoj estas egoismaj. Oni ne povas nei, ke ĝia voĉo havas notojn belegajn. Bedaŭrinde, ili estas ne sentataj, k ne havas ian praktikan celon. K li iris al sia ĉambro, enlitigis, pensis pri sia amatino k ekdormis.

Kiam la luno aperis en la ĉielo, la najtingalo alflugis al la rozarbeto, k premis la bruston kontraŭ la dorno. Dum la tuta nokto, ĝi kantis kun la brusto premata al la dorno, k la malvarma kristala luno haltis silenta aŭdante ĝin. Ĝi kantadis la tutan nokton; la dorno trapenetris pli k pli ĝian bruston, k la sango de ĝia vivo elgutadis iom post iom el ĝiaj vejnoj.

Unue, ĝi kantis la aŭroron de la amo en la koroj de du infanoj; tiam, em la plej alta branĉo de la rozarbeto naskiĝis, petalo post petalo, ĉarma rozo, dum kanzono sekvis kanzonon. Komence, la rozo estis pala kiel la nebulo kiu ŝvebas super la riveroj, k arĝenteca kiel la piedoj de aŭroro. Tiu rozo naskiĝanta en la plej alta branĉo de l' rozarbeto, similis rebilon de iu rozo en arĝenta spegulo, aŭ ombro de rozo en lago.

Sed la rozarbeto kriis al la najtingalo, ke ĝi premu pli forte la bruston kontraŭ la dorno.

— Premu ĝin pli forte, kara najtingalo — diris ĝi — se ne, alvenos la mateno, k vi ne pretigos la rozon. K la najtingalo premis pli forte la bruston kontraŭ la dorno, k sia kanto iĝis pli belsona, ĉar tiam ĝi kantadis la vekigon de l' pasio en la animo de viro k virino.

K, delikata ruĝeco, simila al ruĝeco de fianĉo, kiu kisas la lip-

KONCEPTOJ KAJ PENSOJ

Tradukitaj de Yolanda de Araújo Costa

La aŭtoro, José Maria Machado de Assis, poeto, kronisto, teatrologisto, kritikisto, rakontisto kaj verkisto, estis, pro la multforma kapableco de sia talento, unu el la plej grandaj beletristikistoj el Brazilo.

“Ĉarmo kunigita al la molarala koncepto, verve regita de saĝo, esprimo pli konkreta ol abstrakta, ofte tradukita per neatendita metaforo; sobreca, bonega kaj konciza esprimmaniero, estis kvalitoj de tiu verkisto, kies originoj povus esti bone klarigitaj nur per la transmigrado de la animo de iu heleno el la tempoj de Sokrato”.

Eĉ la doloro ne estas konstanta.

Feliĉaj la hundoj, kiuj per flaro konas la amikojn.

Oni ne decidus sentojn; oni amas aŭ oni malŝatas, laŭ la koro tion volas.

La timo estas antaŭjuĝo de l' nervoj. Kaj antaŭju-

ĝon oni malfaras; sufiĉas la simpla pripensoj.

Vivo estas luktado. Vivo sen lukto estas mortinta maro meze de la universala organismo.

Ĉio mortas, eĉ la espero. Ekzistas sekaj doloroj, same kiel ekzistas mutaj koloroj.

Io forsaviĝas el la pereco de l' iluzioj.

La doloro, kiam oni ĝin kaŝas, doloras pli.

Ekzistas digna rigardo, el tiuj rigardoj, kiuj ŝajnas deveni de la steloj, kia ajn estas la staturo de la persono.

La preĝo estas mistera ŝtuparo de Jakobo; per ĝi la pensoj supreniras al la ĉielo; per ĝi malsupreniras la Diaj konsoloj.

La adiaŭoj pli longaj estas la plej malfacile suferblaj.

La ŝajnigo estas devo, kiam la sincereco estas danĝero.

Ĉiu scias ami laŭ sia ma-

niero ne gravas, la precipo estas, ke oni sciu ami.

Ne ĉiuj animoj povas alrigardi la grandajn krizojn. Oni bezonas fortan spiriton por tiuj ĉi kompleksaj situacioj.

Kiel ajn sendependa estu la spirito de homo, estas malofte, ke ne flatu lin iu timema kaj silenta amikeco, naskiĝinta kaj vivinta en la soleco de l' animo.

La amo estas harmonio inter du naturoj, kiuj sin rekonas kaj sin kompletas.

Per gutoj de akvo oni subkavigas la stratojn.

La estinto estas ŝparitaĵo por tiuj, kiuj jam menion esperas de la estanto aŭ de la estonto; ekzistas tie vivantaj sensacioj, kiuj pleniĝas la mankojn de la tuta tempo.

Eltiritaj el la libro de Júlio César da Silva: “Konceptoj kaj Pensoj” de Machado de Assis.

Carta aberta a Papai Noel

(V. Oliveira)

Papai Noel:

Eu vou colocar, à janela do Esperantujo, não as botinas, nem os chinelos; mas, se conseguir, uma cesta muito grande a fim de vê-la, pela manhã, cheia, muito cheia de novos esperantistas, que se dediquem, lado a lado com aqueles que vêm empregando esforços por um mundo menos desconhecido, à propaganda do melhor instrumento de confraternização — o idioma internacional - auxiliar - neutro, o Esperanto.

Na cesta também não de caber uns litros de combustível com que alimentaremos, cada vez mais, a chama do ideal que reúne homens que falam idiomas diferentes, de diversas pátrias, todos se tornando cada dia mais íntimos, mais amigos, mais vizinhos e mais dedicados ao magno trabalho que se denomina de Fraternidade Universal.

Papai Noel... Novo Ano... Muitos Esperantistas...

ojn de la fianĉino, ekkolorigis la petalojn de la rozo. Sed la dorno ankoraŭ ne estis atinginta la koron de la najtingalo, k pro tio la rozo restis blanka, ĉar nur la sango de la najtingala koro kapablas kolorigi ruĝe la koron de la rozo.

La rozarbeto petis al la najtingalo, ke ĝi premu ankoraŭ pli forte la bruston kontraŭ la dorno.

— Premu ĝin pli forte, kara najtingalo, se ne, tagiĝos antaŭ ol vi pretigos la rozon.

Tiam, la najtingalo premis pli forte la bruston kontraŭ la dorno, kiu rompis ĝian koron. Kruela doloro trairis ĝian korpon, k tiam, pli k pli ardega iĝis la kanto, ĉar nun ĝi kantis la amon, kiu ne finiĝas eĉ en la tombo.

K de tiam, la rozo estis kolorigita kiel la plej belaj rozoj el Bengalo. Ĝiaj petaloj estis purpurkoloraj, k ĝia koro ŝajnis rubeno.

Sed la voĉo de la najtingalo malfortiĝis; ĝiaj etaj flugiloj ek-

flirtis, k malhela nubo vualis ĝiajn okulojn. Ĝia kanto mortis iom post iom, k ĝi sentis ion, kvazaŭ sufoko.

Lastfoje, per doloriga peno, sonoritis en la aero ĝiaj belsonaj notoj. La pala luno aŭdis ilin, forĝis la matenkrepuskon, k kaltis en la ĉielo. La ruĝa rozo ankaŭ aŭdis ilin, vibris ravita k malfermis siajn petalojn al la freŝa matenventeto.

La eĥo portis tiujn notojn al la montaraj deklivoj, tiel vekante la dormantajn ŝafarojn.

K ili ŝvebadis super la kankreskaĵoj de la rivero, kiu alportis ĝis la maro tian belan mesaĝon.

— Rigardu! Rigardu! — diris la rozarbeto — jen jam kreita la rozo. Sed la najtingalo ne respondis; ĝi kuŝis morta sur la herbo, kun la koro trapenetrita de la dorno.

Tagmeze, la studento malfermis la fenestron k rigardis eksteren.

— Kiel feliĉa mi estas! Jen ruĝa rozo! Ĝi estas tiel bela, ke

certe ĝi havas latinlingvan longan nomon. K, kliniĝante, li rikoltis ĝin.

K tuĝ li iris al la hejmo de la profesoro, tenante la rozon en la mano.

La filino de la profesoro sidis ĉe la pordo, bobenante fadenbulojn el blua silko; ĉe ŝiaj piedoj kuŝis hundeto.

— Vi diris, ke vi dancus kun mi, se mi al vi alportus ruĝan rozon; jen ĉi tie la plej ruĝa rozo en la mondo! Vi metu ĝin sur la koron, k, dum ni dancos ĝi rakontos al vi, kiom mi amas vin!

Sed la junulino sulkgigis la frunton k diris:

— Mi timas, ke tiu rozo ne bone harmonius kun la koloro de mia robo; krom tio, la nevo de la Kanceliero ĵus sendis al mi multekostajn juvelojn, k vi bone komprenas, ke juveloj valoras pli ol rozoj.

— Fi, maldankema! — diris furiozege la studento. K li ĵetis

la rozon surstraten. Ĝi falis en fosaĵeton, k estis frakasita de ĉara rado.

— Ĉu mi, maldankema?! K vi, maledukitulo! — diris la junulino — K, krom tio, kiu estas vi? Simpla studento, kiu neniam portis bukojn sur la ŝuoj, kiel la nevo de la Kanceliero.

K, stariĝante, ŝi eniris domenon.

— Kia stulta afero estas la amo! — diris l astudento, forirante. — Ĝi estas eĉ ne duone utila kiel la Logiko, ĉar per ĝi oni nenion pruvas. Ĝi parolas al ni pri ne okazontaj aferoj, k al ni kredigas ne realaĵojn. Verve, la amo ne estas praktika afero, k, ĉar nuntempe ĉio baziĝas sur la praktikaj aferoj, mi denove studos Filozofion k Metafizikon.

K tiam, li eniris hejmen, malfermis grandan libron kovrita de polvo, k eklegis.

Laŭ portugala traduko, esperantigis Maria Angélica de Oliveira.

Tra La Mondo

SVEDUJO: — La kongresa laboro bone progresas: Loka Kongresa Komitato ofte kunsidas, kaj multaj detaloj jam estas pretaj. Kiel vi scias, la Universala Esperanto Asocio okazigos la 33an Mondkongreson, en Malmo (Svedujo), en 1948. Ĉu vi jam aliĝis? Esperanto Centroj sendos al vi informojn, se vi tion deziras.

* * *

BELGUJO: — Je la unua fojo, dum la lernjaro 1946-1947, la urbo Bruselo envicigis Esp. Kurson en la serion de oficialaj Superaĵ Kursoj por plenkreskuloj. kiuj okazas en la urbo lernejo, strato Ernest Allard, 49. La disdono de diplomoj al la lernintoj okazis la 29-an de Majo. La urbaj kursoj rekomenciĝis la 15-an de Septembro 1947-a.

* * *

ĈINUJO: — En Ĉen-Ĉeng, s-ano Liu Hang-Kang komencis Esp. Kurson por gimnazianoj. En Hong-Kong, oni restarigis la Esp. Asocion.

* * *

FRANCUJO: — La urbestro de Perpignan decidis subvencii la lokan Esp. movadon per 5000 frankoj. Ankaŭ, en la sama urbo, troviĝas strato nomata: Strato de l' Doktoro Zamenhof, kreinto de Esperanto.

* * *

EGIPTUJO: — En Kafr el Daŭar, juna s-ano Moh. Ali Ŝerif vigle propagandas inter la skoltoj de la kompanio MISR, kie li laboras. Li ankaŭ publikigis artikolon pri Esperanto kaj Skoltismo, en la araba revuo "Al Naŝra Al Kaŝfia".

* * *

HUNGARUJO: — La oficialaj kursoj, pri kiuj ni jam raportis, finiĝis kun 30 partoprenantoj, kun neatendita sukceso. Espereble, ili jam instruas la lingvon en la ĉefurbaj lernejoj.

* * *

La urbestro de Pécs (sudhungara urbo), s-ino J. Tolnay, partoprenas Esp. Kurson por virinoj. Skribu gratulleteron al ŝi, kaj al ŝi aj samkursaninoj, petante korespondadon. Adreso: K-ino J. Tolnay, urbestro, Székely Bertalan u-9, Pécs, Hungarujo.

* * *

VENEZUELO: — Laŭ sciigo de s-ano Alberto D. Chapartegui, s-ano Losada instruas al 8 personoj Esperanton. En kelkaj gazetoj oni aperigas artikolojn pri Esperanto, gvitaj de frato de s-ano Losada. Oni klopodas starigi grupon en Caracas. Espereble, ili sukcesos!

Niaj Perantoj

- Belo Horizonte — DR. L. DE AZEREDO COUTINHO,
Rua Carijós. 218 - 2.º andar - Sala 26.
- Foz do Iguaçu — CARLOS H. DIONISIO.
Salvador — EDGARD DA SILVA ESTRELA,
Rua 3 de Maio, 12.
- São Paulo — VICTOR MINIERO, Rua Comandante Salgado, 234.
- Pôrto Alegre — ARY ZAMORA, Rua S. Carlos, 1192
Uberlândia — HAROLDO LEITE PINTO, Caixa Postal, 337.
- Manáus — S. Augusto, Rua dos Andradas, 76.

Aliaj gesamideanoj, kiuj deziros reprezenti "RIO ESPERANTISTA"-N en aliaj urboj, bonvole skribu al la redakcio.

Esperanto-Ekspozicio en Singaporo

Okazis Esperanto-ekspozicio, je dimanĉo la 13a de Julio, ĉe la Hou Chio Publika Lernejo, por festi la 60-jaran Jubileon de nia lingvo. La ekspozicio daŭris de la 9-a h. ĝis la 4.30 posttagmeze. La gevizitantoj estis multaj, kaj ili tre interesiĝis pri Esperanto kaj nia laboro. Preskaŭ cent diversaj Esperantaj gazetoj el dudek-ok landoj estis ekspoziciitaj, ankaŭ sennombraj bildpoŝtkartoj kaj leteroj el tridek landoj. Krome, multaj Esperantaj libroj kaj broŝuroj. Dum la tago, Esperantaj gramofondiskoj andiĝis, la ĉambro pleniĝis per la sono de "La Espero", "Tagiĝo" kaj aliaj kantoj. Posttagmeze, la Lernejo aranĝis teo-kunsidon por niaj ges-anoj. En Nan Chiau Jit Pau (unu el la plej grandaj ĉinaj ĵurnaloj en Maloj), aperis je la 15-a de Julio la speciala artikolo pri la ekspozicio.

Ni kore dankas ĉiun, kiu sendis Esperantaĵojn, bildkartojn ktp. al la Ekspozicio. Nun, niaj kunlaborantoj kapablaj ne estas multaj, do, se ni ne povas akcepti la peton de korespondado, bonvolu nin pardoni! Sinceran saluton!

Vere via,
Hou Chio Publika Lernejo
N.º 897 — North Bridge Road.
Singapore.



"Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali
Por reunuigi la homaron!"

D-ro ZAMENHOF

KIAM ESTOS EKSPLODINTA NOVA MILITO,
NI NENION POVOS PLU FARI!
NUN ESTAS LA TEMPO KONSTRUI LA
PACON!

ALIGU AL LA UNIVERSALA LIGO, HODIAŬ,
KAJ VI RICEVOS

ĜIAN MONATAN ORGANON "LA PRAKTIKO"

Jarkotizo por aktivaj membroj: Cr\$ 50,00.
Aliĝoj kaj informoj al la UL-peranto por Brazilo:
NELSON DE SOUZA —::— Caixa Postal 3677
Rio de Janeiro —::— BRAZILIO

Hungaraj gestudentoj, eĉ privatuloj, farus, kun samaj personoj en tuta mondo korespondamikecon en Esperanto, angla, franca, germana kaj aliaj lingvoj. Sendu *sur I. P.*-aŭ perletere* l' adreson kaj datojn: (nomo-sekso adreso- aĝo- profesio (fakultato, lernejo)- interesiĝo-, lingvo de korespondo) al

Sro KOVÁCS GUSTÁV

Budapest, VIII., Üllői-út 20. Hungarujo.

* Lernejoj, Societoj, grupoj, kulboj povos kunkolektitajn adresojn kun bezonataj datoj aŭkaŭ en listoj sendi.

PALACE MÓVEIS

Exposição permanente de Móveis de fino gôsto

P. M. RAWET & CIA. LTDA.

Pc. das Nações 184 — R. Cardoso de Moraes 506-A

Bonsucesso RIO DE JANEIRO Ramos

OLEO!

(Laŭ Johano Jozefo Soiza Reĵli)

La 16an de majo 1909, alproksimiĝas al la Patagoniaj bordoj la "Guardia Nacional" (Nacia Gvardio). Ĝi estas ŝipo de la skadro, kiu havas la mision fari sondaĵojn ĉe la rodo Tilly'. Sur ĝi venas du koloniistoj, sinjoroj Olascocaga k Fernandez. Antaŭ la dezerto, ili diris: "Ni restados tie-ĉi". Ili konstruas domon. Poste, alian. Kaj alian. Ĝis kiam, subite, ili mem ekmiras pri sia laboro: "Ni estas formintaj vilaĝon". Vilaĝon! Ili diras tion fiere. Estas logike. Dudek enloĝantoj, kiuj decidis vivadi tie-ĉi, formas vilaĝon el titanoj. Sed estas necese doni kreolan nomon al tiu sovaĝa urbeto. Ili ne volas bapti ĝin per fremdaj nomoj, sed jes per nomo tre argentina, kiu signifus simbon de ilia propra laborado. Kiu estas la maristo, kiu defendadas persiste la koloniadon de la sudaj regionoj? "La Komodoro Rivadavia".

Jam la vilaĝo havas nomon. La najbaroj kreskadadas en nombro. En 1905, kvar jaroj post la fondo, oni faras la unuan enkalulon.

"Kvardek sep enloĝantoj".

Ili laboras vigle, apud la marbordo, preskaŭ mortantaj pro soifo.

"Akvon".

Ne estas akvo. La pluvoj estas malabundaj. La akvo-ĉaroj devas alporti ĝin el Rosales, per bareloj. Cent litroj da akvo valoras kvin aŭ ses pesojn. Oni suferas la Tantalalan tragedion.

"Akvon".

La 47 najbaroj estas decidintaj eĉ morti serĉante ĝin. Kie? Ili kolektas kvinmil pesojn. Ili donas tiun sumon al la registaro. Ili petas al ĝi bor-maŝinon k du teknikistojn por gvidi ĝin. La Ĝenerala Direktoro de Minejoj, inĝeniero Julio Krause, apogas

entuziasme la ideon de la loĝantoj. En 1905, alvenas la bor-maŝino La 47 loĝantoj aliras al la haveno, portante festajn vestojn, por akcepti ĝin. "Estas domaĝe, ke ni ne havas muzikistaron".

"Kie ni komencos la traboradon?"

Ie ajn. La loko ne gravas. Manke de sciencaj ekzamenoj, la plej kreola estas la antaŭkredo.

"Kie ni fosos la puton?" La bor-maŝino estas por la vilaĝanoj monumento respektinda. Estas necese meti ĝin en honoran lokon.

"Tie-ĉi". Ili metas ĝin, kvazaŭ ĝi estus la statuo al San Martin', sur la ĉefan straton, sur la tereno signita por konstrui la bankon, k sub la gvidado de s-ro Eliseo Castañedas, la bor-maŝino komencis sian sondadon. Kia sublima momento de kolektiva emocio! La popolamaso estas vivanta momenton de nacia Historio.

La borilo de la maŝino batalas peneg kontraŭ la ŝtono. Tamen, ĝi eniĝas, enpenetras, trapasas la tavolojn, serĉante la koron. Cent metroj.

La akvo ne aperas. "Daŭrigu"! La borilo ne ĉesas sian laboron. Kia angoro, tiu de la vilaĝanoj! Aĝulmeto, patrineto de enloĝanto, surgenuiĝas antaŭ la maŝino k preĝas al Dio, petante al Li miraklon.

"Akvon".

La akvo ne aperas. La maŝino batalas, vibras, tremas kiel homa muskolo. Subite, alvenante al 200m., oni ekaŭdas teruregan bruon. La borilo! Ĝi difektiĝis! Ĝi jam ne taŭgas! La vilaĝo pleniĝas de silento. La najbaroj venas hejmen, meditante, la okuloj fiksitaĵ sur la grundon. Ili ne volas eĉ rigardi unu la alian. Ili deziras nek aŭkulti sin reciproke. Se ili parolus unu solan vorton, se ili rigardus unu la ali-

an, nur unufoje, ili ekplorus, unu ĉirkaŭbrakante la alian...

Tiu unua puto estas ja fiasko. Ne estas akvo! Tamen, ili ne cedas. Ili persistas. "Ni faros puton aliloke". El la internaĵoj de la tero eliras ankoraŭ la voĉo de la princino de la arabaj rakontoj, kiu kuraĝigas ilin daŭrigi la skrapadon. Daŭrigas la rabdomantoj (araba vorto).

En 1906, ili faras formalajon por venigi alian pli potenca maŝinon. La registaro sendas borilon "Rauch-Express". Krome, venas bonega teknikisto pri boraĉo, Jozefo Fuchs, k lerta helpanto pri hidrologio, Humberto Beghin. Oni entreprenas la laboron en 1907. Oni elektas lokon malproksiman de la malnova puto. Kaj tien iras denove la najbaroj. Puto n.º 2. Ĉiutage, post ellitiĝo, ili aliras procesie ekzameni la maŝinon. Alvenas la monato Decembro. Fuchs k Beghin multobligas, k deziregas elanime, ke la maŝino ne ĉesu trabori la tavolojn de la subgrundo. La maŝino estas garantiata por 500 metroj da profundeco.

Ĝi estas atinginta la 400 metrojn. Iomete plu! Estas la lasta tago: 13a de Decembro 1907. La maŝino, frenezigiĝinta kvazaŭ ĝi ankaŭ soifus, enigas kolerege sian buŝegon en la internaĵon de la tero.

"Ĉu io?" "Nenio".

"Daŭrigu".

"Kio okazas? Akvo?"

Ne! "Kerozeno!"

Ĉu doloro, malĝojo? Kontraŭe. Ĝojo, gajeco. Festado... Ĉiuj komprenis, ke ili ne povis trovi akvon, sed ili estas trovintaj ion, kio valoras multe pli.

Nigra oro! Oleo!

Esperantigis E. H. Garroto.

(Argentino)

RICEVITAJ PUBLIKAĴOJ

La Juna Vivo: — n.º 118, TJO West-Graftdijk, Nederlando.
Malgranda Revuo: — n.º 3, Ludvika, Svedujo.

La Folio: — n.º 8, Malmo, Svedujo.

O Espiritualista: — ns. 42-43, São Paulo, Brazilo.

Bult. de Rega Belga Ligo Esperantista: — n.º 6, Bruselo, Belgujo.

Heroldo de Esperanto: — n.º 16, Bruselo, Belgujo.

Clube Excursionista de Ramos: — n.º 19, Rio de Janeiro, Brazilo.

Reformador: — n.º 10, Rio de Janeiro, Brazilo.

Esperantisto Slovaka: — n.º 15-16, Trenčini, Slovakujo.

Nederlanda Esperantisto: — n.º 9, Amsterdam, Nederlando.

S. Paulo Esperantista: — n.º 4, São Paulo, Brazilo.

SOCIALAJ NOTOJ

Dum la nuna monato, festas sian naskiĝan datrevenon la jenaj asocioj:

- 4 — Noemi Coelho Bittencourt
- 10 — D-ro Helbio Rego Lins
- 10 — Manuel Aveza de Sousa
- 12 — José Gomes Braga "Dua"
- 16 — Arnaldo Gonçalves Pires
- 23 — Délio Pereira de Souza
- 30 — Nelson Pereira de Souza.

Al ĉiuj, niajn elkorajn gratulojn.

KORESPONDADO

S-ano Paulo de O. Ludka.
Pri Geografio, religio, lingvoj, poŝtkartoj.

R. Barão do Amazonas, 84 — Niterói.

Est. do Rio. — Brazilo.

S-ano Henerik Kocher.
Lingvoj kaj poŝtkartoj.

R. Castro Tavares, 32.

Manguinhos.

Rio de Janeiro — Brazilo.

A. S. REZENDE

— Inĝeniero —

projektoj kaj antaŭkalkuloj por loĝdomoj luksaj, hoteloj, hospitaloj, lernejoj, kaj aliaj konstruaĵoj.

Informpetoj en lingvoj portugala, franca, — angla kaj Esperanta

Adreso: Caixa Postal 2917

Rio de Janeiro

Brazilo

Agência São Jorge

(Agentejo Sankta Georgo)

Biletoj por vojaĝoj surmaraj, surteraj kaj aeraj

TURISMO

IMPORTADO KAJ EKSPORTADO

*

JORGE SOARES & CIA. LTDA.

PRAÇA MAUA' N.º 67 — RIO DE JANEIRO, BRAZILIO

(ĉe la havenkajo)

ESPERANTO VENKAS

Laŭ sciigo ricevita el la ŝtato Rio Grande do Sul, pere de "Suda Stelo", la II Kongreso de Duagradkursaj Studentoj prezentis gravan rezolucion, kiun ni aperigas ĉi-sube:

La ŝtata Unio de Studentoj, de Rio Grande do Sul, Brazilo, pere de siaj membroj, kunvenantaj en la urbo Pôrto Alegre, kaj reprezentantaj la ĉefajn fakultatojn de ĉi tiu ŝtato,

KONSIDERANTE, ke la lingva malsameco malfaciligas la amikajn rilatojn inter la popoloj, malhelpante ties progreson, kaj la rapidan diskonigon kaj popularigon de la Sciencoj, Literaturoj, kaj Artoj;

KONSIDERANTE la urĝan bezonon detrui la lingvan baron, por ke ekestu la Paco, kiu faciligos la marŝon de la socia evoluo kaj de la Fratigo de la Homoj;

KONSIDERANTE, ke la lingvo artefarita **ESPERANTO**, pro siaj kvalitoj je logiko, simpleco, morfologio, fonetiko, facila adaptebleco, sintakso kaj klareco, estas la sola meritanta oficialiĝi kiel Internacia, Neŭtrala Helplingvo;

KONSIDERANTE, ke krom siaj nerefuteblaj kvalitoj, la lingvo **ESPERANTO** enhavas noblan Idealon kaj Ampleksan Celon;

KONSIDERANTE ankaŭ, ke estas devo de la studentaro apogi **ESPERANTON**, kontribuante efike por la pligranda potenco kaj feliĉo de la Patrujo kaj de la Homaro;

DECIDAS

- 1) Deklari, ke ni konsideras **ESPERANTON** grandvalora kaj utila.
- 2) Rekomendi al ĉiuj studentoj kaj filiitaj organizaĵoj, ke ili kunlaboru je la propagando, diskonigo kaj instruado de **ESPERANTO**.
- 3) Sugesti al la edukaj aŭtoritatoj la enkondukon de **ESPERANTO** en la lernejojn: Unuagradan, Duagradan, Teknikan, Profesian, kaj Instruistan; en la kursojn pri lingvoj novla tinaj kaj anglaj-germanaj, de la Filozofiaj Fakultatoj — almenaŭ kiel nedevigan lernobjekton.
- 4) Rekomendi al la Studentaj Organizaĵoj la starigon de Esperanto-Departementoj, kiuj pli bone povos efektivigi la rekomendon numero 2.
- 5) Rekomendi al ĉiuj studentoj la lernadon de **ESPERANTO** kaj ĝian uzadon, kiam eble, en la interkorespondado kaj prezentado de temoj.
- 6) Adopti **ESPERANTON** kiel helplingvon por ĉiuj laboroj de l' ŝtata Unio de Studentoj, kaj por ĉiuj eldonaĵoj internacie disdonataj.

Kunsido-Ĉambro, urbo Pôrto Alegre, la lan de Oktobro 1947.

FOGÃO A ÓLEO "POPULAR"

Sem torcida — Garantido — Desmontável. — Vendas na Fábrica. — Demonstramos sem compromisso. — Preço popular — à vista — atacado — prestação sem entrada. LUZARTE FABRICA LTDA. — Av. Pres. Vargas, 917, 1.º

GEESPERANTISTOJ!

Donu preferon al >

GRÁFICA RIO

Rua General Pedra, 339 - A

Presajaĵoj ĝeneralaj. Perfekteco kaj rapideco.

Ĉe la fino de plu unu laborjaro, AERJ deziras al ĉiuj siaj membroj kaj gesamideanoj ĝojplenajn festotagojn kaj fruktodonan feliĉan novan jaron, kiu estu larĝa ŝtupo al la fina venko!

La venko de la vivo

Esperantigis M. Aveleza de Sousa.

Se vi, senkuraĝulo, pensas esti venkita,
Via malvenko estas afero decidita.
Vi volas venki, sed, ĉar vin ne kredas,
Via malkredo tute vin subpremas.
Se vi imagas perdi, perdita ja vi estas.
Kiu sin ne fidas, tiu iras malantaŭen;
La forto, kiu vin antaŭen puŝas
Estas la decido firma en via menso.

Sennombraj entreprenoj ja frakasas
Eĉ antaŭ ol komenci funkciadi;
Multaj malkuraĝuloj ja dezistas
Eĉ antaŭ ol komenci la luktadon.
Kredu je via povo, kaj via povo kreskos;
Imagu vin malforta, kaj baldaŭ vi pereos.
Potenco multepova estas la volo
Kaj la decido firma en via menso.

Malforta estas tiu, kiu tia sin imagas;
Kiu la alton rigardas, al alto destiniĝas;
La fido al si mem estas la vojo
Al la altegaj pintoj de la Venko.
Ne ĉiam kiu plej kuras la celon trafas,
Nek ĉiam pli sukcesas la plej forta,
Sed tiu, kiu, memfida, antaŭen iras,
Kun la decido firma en sia menso...

El la revuo "O Pensamento" (La Penso)

V. Excia. já pensou em adquirir seu **Calçado!**

Não o faça sem primeiro fazer uma visita aos nossos mostruários e preços

CASA RAYON

RUA ARQUIAS CORDEIRO, 278

Fone 29-1359 (Meyer)

ESPERANTA MURKALENDARO

Ĉiamdaŭra, luksa, el bona ligno kaj kartono, laŭ la formato 30 x 20 centimetroj. — Prezo: Cr\$ 40,00.

Mendoj al ASSOCIAÇÃO ESPERANTISTA DO RIO DE JANEIRO, Caixa Postal 3677, Rio de Janeiro, Brazilo.

20a S.A.T.-Kon- greso

*Okazis de la 2^a ĝis la 7^a de
aŭgusto lasta, en urbo
Aarhus, Danujo.*

Nur en ĉi-numero ni povas prezenti, al nia legantaro, la raporton pri tiu grava kongreso. Multe malhelpis nin la malfruigo de la noticoj, ĉar nur en la mezo de novembro, "Sennaciulo" alvenis al nia redakto, kaj tiam estis jam tute preta la materialo por la novembra numero.

Post 8 jaroj de interrompo, pro la ŝtatestra egoismo kaj sekva sangavida milito, okazis la 20^a SAT-kongreso, kiun partoprenis 662 homoj el 9 landoj; kaj ĉio marŝis tre bone. La Organiza Komitato plensukcese aranĝis la kunvenojn, promenadojn, kaj la balon; tial ĝi ja meritas ĉies gratulon kaj aplaudon.

La solena malfermo okazis en la impona Popoldomo, kaj en la grandioza salono de la urbdomo la urbestro regalis la gekongresanojn per abunda lunĉo. Ankaŭ okazis tuttaga ekskurso al la "Ĉiel-monto", la kulmina pinto de Danujo, kiun grimpis ĉirkaŭ 500 SAT-anoj.

Kaj regataj de harmonio kaj toleremo, fruktodone okazis la laborkunsidoj, kies detalojn ni prezentas ĉi-sube:

LA UNUA LABOR- KUNSIDO

efektivigis je lundo, la 4^a de aŭgusto, kiam okazis ĝenerala elektado, nome:

prezidantoj: Claudy, Hansen, Johansen, Rosenbloom kaj Van Essen; protokollantoj: Bultemeijer, Dazun, Ten Hagen; proponkomisiono: Einar, Nora Walton, Roberts; voĉdonkomitato: De Haan, Melton, Nilson.

Ĝin prezidis S-ro Rosenbloom, kaj paroladis la aŭstra SAT-peranto, S-ro Sager, salutante la kongreson, kaj S-ro Bannier parolis por la Plenum-Komitato.

Kaj ankoraŭ en la sama tago, tuj post la unua, okazis

LA DUA LABOR- KUNSIDO

sub la prezido de S-ro Claudy. Parolis S-roj Chiland, Bannier, Thorsen, Kruit, Leereveld, Petro Jayar kaj Van Essen, kaj ĝenerale la debatoj temis pri: la petskribo de U. E. A., propagando de Esperanto, kunlaboro kun la neŭtraluloj, k. a.

LA TRIA LABOR- KUNSIDO

okazinta je la 5a de aŭgusto, sub la prezido de S-ro Van Essen, prezentis la temojn: la kreota Internacia Centra Komitato, la telegramo el la U. E. A. — kongreso, Esperanto en la lernejoj, k. a. Parolis S-roj Roberts, Kruit, Leereveld, Thorsen, Sulski, Moth, Andreo, Neergaard, Dehan, kaj Bannier.

LA KVARA KUNSIDO

okazis la 6an de aŭgusto, prezidata de S-ro Hansen. Debatis S-roj Kruit, Moth, Roelofs, Van Essen, v. d. Starre, Marso, Leereveld, Bannier, Neegaard, Sulski, Dazun, Chiland, Roseel, kaj Piron, kaj la debatoj temis pri: religiuloj kaj S. A. T., elekto de nova konfliktkomisiono (S-roj Bishof, Roelofs kaj Ten Hagen, en Amsterdamo), aprobo de Rezolucio prezentita de la P. K. (ĝin ni aperigas aparte), kaj fine decido, ke oni akceptu la inviton de la SAT-perantino en Amsterdamo por ke la venonta kongreso, je 1948, okazu en tiu urbo.

Kaj per "Internacio" finigis la lasta laborkunsido.

REZOLUCIO

La 662 S. A. T. anoj kunvenintaj en AARHUS:

-- konstatas kontente, ke la 20-a Kongreso de S. A. T. okazis en atmosfero el karmonio k toleremo,

— konfirmas la validon k pravon de la teksto k spirito de la unua paragrafo de la Statuto, esence ke S. A. T. ne estas partipolitika sed nur kleriga, eduka, kultura organizo por la klasaj celoj de la Laboristaro tutmonda,

— akcentas ĝian sennacian karakteron, kiu ne permesas al la Asocio alpreni pozicion en problemoj specife nacieca, tamen lasante al ĉiu SATano aparte ĉian liberon por decidi pri sia individua agado ekster la Asocio.

— esprimas sian senrezervan simpatian al la fratinoj SATanoj kiuj, kvankam jam suferinte kruele sub la faŝista reĝimo, daŭre suferas pro la suspekto devenanta el erara ĝeneraligo koncerne la respondecon pri la milito. Al tiuj malfeliĉaj fratinoj, la SATanoj en Aarhus premas kore la manon k esperas akcepti ilin en la proksima kongreso.

— substrekas ke la pordejoj de SAT restas larĝe malfermitaj al ĉiuj klaskonsciaj laboristoj esperantistaj k invitoj ilin envicigi por ke la Laborista Esperanto-Movado povu ludi sian rolon socian en la fondo de nova mondo pli bona.

— deklaras, ke SAT denove reprenis sian lokon en la decida batalo por la homrajtoj k por la libereco de la homaro kontraŭ rasaj, religiaj, imperiismaj k lingvaj hegemonioj, k kontraŭ la ĉefaj malamikoj de la homaro: ĉiaj faŝismoj, kies ĉefaj krimoj postulis milojn da viktimoj ankaŭ en la esperantistaro.

— pretas kontraŭbatali tendencojn fatalismajn, kiuj konsideras novan militon neevitebla, k subteni la batalon kontraŭ la preparoj por nova milito sub la signo de la atomobombo.

RIO-ESPERANTISTA Propriedade da A.E.R.J. Um jornal do Rio para o mundo

Redação e administração:
R. das Marrecas, 19 - 2.º and.
Tel. 22-5300 — C. Postal 3677
Rio de Janeiro — BRASIL

Diretor responsável

Nelson Pereira de Souza
Gerente

Delio Pereira de Souza
Redator-chefe
Lászlo Zinner

Redatores

Manuel Avezeza de Souza
Dr. Braz Cosenza

Auxiliares

Othon Crespo Nunes
José Cosenza

*

EXPEDIENTE:

As importâncias referentes as assinaturas de RIO-ESPERANTISTA, deverão vir em nome do nosso gerente, Delio Pereira de Souza, bem como, quaisquer quantias, Vales-Postais, cheques, etc.

Este jornal dá ampla liberdade aos seus colaboradores, não se responsabilizando pelos conceitos emitidos em artigos assinados e implicitamente nas seções que tenham redatores responsáveis.

*Organizaĵo je servo de la
UNIVERSALA FRATECO*

La gazeto rajtigas tutan liberon al siaj kunlaborantoj kaj ĝi ne respondecas por la enmetitaj konceptoj en artikoloj subskribitaj kaj sekve, por la fakoj, kiuj havas respondecajn redatorojn.

Estas permesata la represigo, ĉu parte, ĉu tute, de la artikoloj, kondiĉe ke oni citu

Representações e Conta Própria

GETULIO S. ARAUJO

Rua da Alfândega, 79 - 2.º
Rio de Janeiro

Oni korespondas Esperante

HUGO C. DE ALBERGARIA

Escritório de advocacia

Av. Rio Branco, 114 - s. 131

DR. ADOLPHO STAERKE
Livre docente da Universidade do Brasil
Clínica de senhoras

Residência: **Consultório:**
RUA BELA S. LUIZ, 68 **R. ASSEMBLÉIA, 58-1.º**
Tel. 48-5892 **Tel. 42-3835**

Rio Esperantista

Orgão oficial da A E R J.

PENSAMENTO E TRABALHO PELA FRATERNIDADE UNIVERSAL

Diretor: Nelson Pereira de Souza

Redator-Chefe: László Zinner

Assinaturas:

Brasil — Cr\$ 15,00
Exterior — Cr\$ 30,00
Ou 25 Coupões-resposta

Rio de Janeiro, Dezembro de 1947

ANO I — Edição mensal — N.º 9

Redação e administração



R. das Marrecas, 19, 2.º and.

Tel.: 22-5300 — C. P. 3677

Avulso Cr\$ 1,00

A.E.R.J. okazigis ekskurson al Ibicuí je la 30a. de novembro de 1947. Jen la partoprenantoj de la ekskurso: kun la esp. flago f-ino Edina Freitas kaj Marly, filino de nia diligenta samideano Octaviano da Silva Lopes.

En la grupo troviĝas de maldekstre al dekstro: S-ino Margarida de Souza Franco Lopes, S-ino Maria Saraiva, S-ino Antônio Saraiva Varão, S-ino Laszlo Zinner; en la akvo f-ino Edina Freitas, F-ino Marly kaj iu simpatianto de Esperanto.



Os clichés que encimam estas notas se referem à praia de Ibicuí, em 30 de novembro último.

Os excursionistas partiram da estação Pedro II, às 5,30 horas e chegaram na aprazível praia do Estado do Rio, às 7,30.

As duas meninas que sustentam o estandarte esperantista são: Marly, a da direita, filha do nosso estimado samideano Otaviano da Silva Lopes, e, a da esquerda, a gentil senhorinha Edina Freitas.

No grupo vemos: Laszlo Zinner, Antônio Saraiva Varão, D. Maria Saraiva, Dona Margarida de Souza Franco Lopes, Marly Lopes, Edina Freitas e Otaviano da Silva Lopes.

Durante a mencionada excursão, os esperantistas realizaram boa propaganda da língua de Zamenhof, distribuindo folhetos, ostentando o signo e o estandarte esperantista, e, ainda, cantaram músicas no idioma auxiliar.

dência” de Belo Horizonte antaŭ du jaroj enkondukis Esperanton en siajn programojn, rezulte de la sindona laborado de nia Wilson Veado, kiu senhalte, konstante, neniam laciĝante, daŭrigas sian poresperantan laboron en la citita radiostacio, ĉiusemajne.

Ni ĉiuj spirtene aŭskultadis la bonege organizitan feston, kiu memorigis la duan datrevenon de tiuj Esperantaj programoj.

Ni kore gratulas al Wilson kaj liaj kunlaborantoj.

Kun tiaj esperantistoj, Esperanto nepre devas venki!

Ankaŭ la kulturfako de la Asocio prezenti programon dum la poresperanta festotago okazinta je la 16-a de Novembro, ĉe “Spiritisma Federacio”. La oficiala parolanto, en nomo de la kulturfako, estis s-ino Cedilha Neto, kiu faris brilan paroladon kiun ni aperigos en sekvonta numero de RIO ESPERANTISTA, kune kun alia detala raporto.

Ni do invitas vin ĉeesti niajn kulturkunvenojn, kiuj okazas ĉiam sabatvespere, je la kvara kaj duono. Rua das Marrecas, 19, dua etaĝo. Lapa.

“BRASIL POLICIAL”

Um dos órgãos de imprensa que vem prestando eficiente colaboração à causa esperantista é o jornal especializado em assuntos policiais, do esperantofilo sr. dr. Alberto Potier Junior — “O Brasil Policial” que se edita nesta Capital.

Niaj Kulturkunvenoj

Dum la kutimaj kulturkunvenoj de Asocio Esperantista de Rio de Janeiro, gvidataj de s-ano Laszlo Zinner, de la 25-a de Oktobro ĝis la 29-a de Novembro, okazis la jenaj paroladoj kaj laŭtleĝoj:

S-ano Varão faris bonegan paroladon pri Esperanto-Idealo, kiu estis serioze pristudata. Tiaspecaj paroladoj taŭgas precipe pro novbakitaj esperantistoj, sed estas ankaŭ bonega instigo por la malnovuloj.

S-ano José Cosenza paroladis pri Zamenhofaj ideoj. S-ano Lazaro Brieger rememorigis nin pri sia malliberiĝo, kiel esperantisto, dum la nazi-faŝista regado en Germanujo.

Je la 15-a de Novembro, ni dediĉis nian kulturkunvenon al la aŭskultado de radio-programo dissendita el Belo Horizonte, sub la gvido de nia ŝatata kaj fortvoĉa s-ano Wilson Veado. La radiostacio “Rádio Inconfi-

Quer um belo presente para seus filhinhos? Compre os livros “Meus Contos Infantis” e o “Jornaleiro Vencedor”, de ALMA CUNHA DE MIRANDA, que acabam de sair em segunda edição, ilustrada por Percy Lau. Edição de Irmãos Pongetti.

“A FRUGAL” PENSÃO VEGETARIANA

Refeições saborosas, nutrientes e saudáveis, à base de frutas e hortaliças, cruas e cozidas.

Ambiente familiar. — Livros para consulta.

Direção de Edgard Carvalho de Mendonça, Secretário Geral da Sociedade Naturista do Brasil

RUA DO CARMO N.º 24 — Tel. 22-5366 — RIO

(Fundos da frutaria)

Local em adaptação